Raporto UNESKO 2015- malneto

La 38a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazis en Parizo de la 3a ĝis la 19a de novembro 2015. Kiel kutime ĝi komenciĝis per la debato de ĝenerala politiko kaj 194 ŝtatreprezentantoj intervenis.La ĉefaj temoj rilatas al la celoj 2015-2030 : daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj (UNESKO partoprenis al la pretigo de grava renkontiĝo en Parizo : COP21) altkvalita edukado por ĉiuj kun altkvalitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kulturaj diversecoj kaj de monda heredaĵo, rajtoj sinekspremi, protektado de ĵurnalistoj…

Ekde la komenco merkrede matene, la reprezentantoj de ILEI-Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj- Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet rondiris en la salonego kaj disdonis pli ol 250 flugfolioj al proksimume 50 delegacioj dum la semajno. Tiun jaron ni strebis alparoli homojn en ilia gepatra lingvo ĉiam kiam eblis. Niaj dokumentoj estis tradukitaj al 14 lingvoj tiel ni same faris kiel UEA.Tiel ni kontaktis izolitajn homojn kiuj ofte malkovris la internacian lingvon kaj montris grandan intereson. La prelegantojn plurfoje uzis sian gepatran lingvon,tiel ni aŭdis la turkan, la portigalan, la serban, la germanan…La angla lingvo estis uzita proksimume cent fojojn, la francan 50 fojojn ; la reprezentanoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 15 fojojn la araban, 14 fojojn la hispanan, 3 fojojn la rusan kaj 2 fojojn la ĉinan- parolis ne nur la reprezentanto de Ĉina sed ankaŭ la eksprezidanto de la 37a Ĝenerala Konferenco.